

## PLANOJ POR MAJO

Post la intensa aktivado en aprilo (vidu poste), ankaŭ por majo estas antaŭvidataj diversaj okazaĵoj por madridanoj, kun rilato al la internacia lingvo.

La unuan partoprenos pluraj madridanoj, eĉ se ĝi ne okazos en la ĉefurbo mem: temas pri la **Triopa Kongreso**, la renkontiĝo en Malago en kiu oni celebros tri samtempajn Esperanto-kongresojn: la hispana, la andaluza kaj la internacia kongreso de fervojistoj.

Jam aliĝis ĉ. 170 homoj, kelkaj el kiuj venas el tiom foraj landoj kiel Japanio, Ĉinio, Kubo, Brazilo aŭ Meksikio, krom dekduo da eŭropaj landoj. Oni anoncis eĉ grandan lastatempan novaĵon: vizitos la kongreson Margareta Zaleski-Zamenhof, la pranepino de L.L. Zamenhof!

Vi ankoraŭ havas tempon aliĝi, eĉ surloke, do ne hezitu veni al Malago. Vi povas vidi ĉiujn detalojn en: <http://esperanto-andalucia.info/>.


En tiu retejo oni povas trovi la plej ĝisdatan version de la antaŭvidita programo. Ni povos ĝui ampleksan selektadon de spektakloj, kun muziko de esperantistaj artistoj kiel Grazia Barboni, Kajto aŭ Saša Pilipoviĉ, kaj ankaŭ muziko de andaluzaj artistoj kiel Rocío Alba, Pedro Carrillo aŭ la orkestro Concerto Málaga. Ni ankaŭ povos ĝui paron da muzikaj-teatraj spektakloj gvidotaj de nia Miguel Fernández. Estas antaŭvidataj multnombraj ekskursoj kaj turismaj vizitoj al Malago mem kaj al pluraj najbaraj urboj (Granado, Kordovo, Antekero...) kaj eĉ al la nordo de Afriko. Estas programitaj ankaŭ kursoj de Esperanto, prelegoj pri plej diversaj temoj, debatoj, kunvenoj, renkontoj, ekzamenoj de Esperanto, kaj multaj ŝancoj por babilo kaj amuziĝi, tutsimple.

## KULTURAJ PREZENTADOJ

Aparte, ni volas anonci du kulturajn eventojn, en kiu Esperanto ĝuas ian rolon, sed ne estas mem la kerno de la afero.

La **10an de majo**, vespere je la 7-a, estos prezentita la libro: «De Gandesa a Grossbeeren. De defender la República a los campos nazis» de Gemma Masip. Gemma estas la fratino de la konata esperantisto Farri, kaj la libro rakontas la sperton de ilia patro, kiu estis unu el tiuj nomataj “sklavoj de Hitlero”, laboristoj kiuj estis translokitaj al Germanio ene de la akordoj inter la tiam aliancitaj registaroj de Hispanio kaj Germanio kaj ekspluatitaj de la tiea reĝimo. Parto de la esploro de la aŭtoro fariĝis danke al la surloka helpo de la germaniaj esperantistoj. La loko de la prezento estas la librejo Trotajueves, en la strato Antonio Lancha, 17 (metrostacio Plaza Elíptica)

Dum tiuj ĉi monatoj oni montras en la Muzeo de Historio de la urbo Madrido (Fuencarral, 78, metrostacio Tribunal) ekspozicion pri edukado titolitan “Madrid, ciudad educadora 1898/1938 – Memoria de la Escuela Pública”. En ĝi aperas Esperanto, en ĉefa video, en mencio pri Sidonio Pintado, granda renoviganto de la pedagogio en la 20aj kaj 30aj jaroj, tre aktiva esperantisto (interalie, iama prezidanto de la Hispana Esperanto-Asocio), mortigita post la milito. Eblas viziti individue, sed ni mendis kolektivajn viziton de esperantistoj, por la **22a de majo**, je la 6-a vespere. Skribu al [madrid@esperanto.es](mailto:madrid@esperanto.es) se vi deziras akompani nin, por rezervi vian lokon, kaj vi povas informi ankaŭ neesperantistajn amikojn por partopreni la viziton.



EL TROTAJUEVES  
Librería Asociativa de Viajes y Literatura  
Calle Antonia Lancha 17  
WWW.TROTAJUEVES.ES

Presentación del libro:  
**DE GANDESA A GROSSBEEREN**  
De defender la República a los campos nazis  
de Gemma Masip  
VIERNES 10 DE MAYO  
a partir de las 19:00 h.

TELÉFONO/WHATSAPP: 660493462  
E-MAIL: trotajueves@trotajueves.es

**AKTIVADOJ EN APRILO**

Kiel ni anoncis en pasinta numero, la 4an de aprilo madridaj esperantistoj vizitis la muzeon kiun la Universitato Politeknika de Madrido dediĉas al la hispana inĝeniero kaj inventisto Leonardo Torres Quevedo, mem esperantisto, kaj en kiu oni konservas diversajn maŝinojn kreitajn de Torres-Quevedo, ĉu originalaj, ĉu kiel modeloj. Ĝi estis tre interesa kaj rekomendinda vizito, la gvidado estis tre instrua, kaj ni tre rekomendas la muzeon por interesitoj.

Esperanto denove rolis dum la sinsekva kompleta legado de la verko Don Quijote de La Mancha, en la Círculo de Bellas Artes, okaze de la Tago de la Libro. Peru kaj Manolo legis du pecojn de tiu verko en Esperanto, la merkredon 24an de aprilo.



La 26an de aprilo disvolviĝis nova celebrado de “la Nokto de la Libro”, kiun organizis la Registaro de la Madrida Regiono, ĉijare kun speciala atento al la figuro de Federico García Lorca, en la centa datreveno de lia veno al Madrido. Madrida Esperanto-Liceo partoprenis per tre interesa prelego de Miguel Fernández pri la poezio de Lorca, kaj ties kunteksto, kun titolo “Lorca, poeto ekstreme universala kaj ekstreme loka”, en nia sidejo. Partoprenis deko da ĉeestantoj, ankaŭ neesperantistoj.

**VIZITIS NIN**

Kiel anoncite, londona komencanto, Maria, vizitanta la urbon pro laboro, ĉeestis la lundan kunvenon, la 8an de aprilo.

Ne anoncite sed same ĝojige, la 29an vizitis la sidejon du eksterhispanaj vizitantoj, troviĝantaj en Madrido: Unika, el Koreio, kaj Fernando Maia, brazilano kaj estrarano de UEA, ĉilasta survoje al la malaga kongreso.

**KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ**

Kutimaj ĉiusemajnaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30. Atentu ke oni nuligis la kutiman unuasabatan renkontiĝon, pro la koincido kun la hispana Esperanto-kongreso.

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL <http://www.esperanto.es/mel>, kaj la retliston [http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto\\_madride/](http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/).

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: <https://www.facebook.com/esperanto.madrid/> aŭ la pli ĝenerala <https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/>. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: <http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta>.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

[madrid@esperanto.es](mailto:madrid@esperanto.es)



Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al [niavocho@gmail.com](mailto:niavocho@gmail.com)